WIKIPEDIA

Piemonta lingvo

La **piemonta lingvo** (piemonte *Piemontèis*, itale *Piemontese*) estas latinida lingvo tradicie konsiderata dialekto de la itala lingvo, kiun parolas proksimume 2 milionoj da homoj en la regiono Piemonto en nordokcidenta Italio. Ekde la jaro 1981 ĝi estas de la Konsilio de Eŭropo oficiale agnoskita kiel malplimulta lingvo kaj troviĝas en la ruĝa listo de endanĝerigitaj lingvoj de Unesko. La lingvo apartenas al la okcidentlatinidaj lingvoj kaj listiĝas inter la gaŭlo-latinidaj lingvoj: fakte ĝi pli similas al la franca aŭ okcitana lingvoj ol al la norma itala lingvo, kiu apartenas al la orientlatinidaj lingvoj. Pralingvo de la piemonta estas la mezepoka vulgara latino, kiu miksiĝis kun lokaj keltaj lingvoinfluoj. Multaj vortoj venis el la arpitana lingvo, el keltaj kaj ĝermanaj lingvoj.

Kiel skriba lingvo la piemonta uziĝas ekde la fino de la 12-a jarcento. Dum la 16-a jarcento evoluis vasta literaturo kun nacilingva karaktero, kiu ampleksis ĉiujn literarajn formojn, poemojn samkiel romanojn, dramojn kaj epopeojn. Ekde la 19-a jarcento ankaŭ ekestis natursciencaj, lingvistikaj kaj literaturkritikaj tekstoj.

Ekzistas aparta vikipedia branĉo en la piemonta lingvo, kaj inter la kleruloj estis la ĵurnalisto Tavo Burat.

piemonta lingvo (Piemontèis)	
Parolata en	regiono Piemonto en nordokcidenta Italio
Parolantoj	2 000 000
Denaskaj parolantoj	ĉ. 2 milionoj
Skribo	latina
Lingvistika klasifiko	
hindeŭropa	
Italika	
Latinida	
Gaŭlo-latinida	
piemonta lingvo	
Lingva statuso	3 sendube endanĝerigita
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	roa
ISO 639-3	pms
SIL	pms
Glottolog	piem1238
Angla nomo	Piedmontese
Franca nomo	piémontais
Vikipedio	

Eksteraj ligiloj

- retejo de "Gioventura Piemontèisa", movado por la lingva identeco piemonta (paĝoj piemontlingvaj) (http://www.gioventurapiemonteisa.net/)

La Patro Nia

Pare nòst, ch'it ses ant ij Cej,
ch'a sia fàit sant tò nòm,
ch'a ven-a tò regn,
ch'a sia fàit tò vorèj,
coma 'n cel parèj an tèra.
Dane ancheuj nòst pan ëd mincadì,
e gavne nòstri débit,

'me noi i-j gavoma a nòsti debitor.
E lassne nen an tentassion,
ma liber-ne dal mal.

Àmen.

Mapo pri la piemonta lingvo

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Piemonta_lingvo&oldid=6820617"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 15:03, 28 dec. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.